# Novjorka Prismo

Numero 116 Septembro 2002


*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia septembra kunveno.*

DATO: Vendredon, la 20-an de septembro 2002, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

**7:00 – Nijl Blonstein gvidos diskutadon pri la someraj kongresoj Esperantaj.** ★

## La somera pikniko

Sabaton, la 22-an de junio, nia klubo okazigis sian ĉiu-jaran piknikon. La loko por la ĉi-jara pikniko estis la hejmo de nia Kasistino, Sofiya SOSKINA, kaj ŝia familio, la patro kaj la filo KOPMAN, ankaŭ esperantistoj kaj membroj de nia klubo. La patro de Sofiya ankaŭ ĉeestis. Li loĝas en Israelo, kaj li estis tie por vizito. Laŭ mia takso, ĉeestis inter 15 kaj 20 personoj. La pikniko komenciĝis je tagmezo.

La apartamento lokiĝas en la urbeto Pelham, en la kantono Westchester, ne malproksime de la landlimo de la urbo Novjorko. La apartamentaro estas apud golfejo.

En la salono, ni rigardis parton de vidbendo pri Odessa, kiu montras statuon de Zamenhof. Poste, kelkaj personoj ludis gitaron kaj kantis kantojn en Esperanto, la kutimajn kantojn, *La Espero*, *Gŭantanamera*, *Marijana*, kaj la kanton pri la fromaĝo . . . Ni trarigardis kantolibrojn, serĉante aliajn, novajn kantojn por kanti.

En la manĝejo, ni manĝis manĝaĵojn kaj trinkis trinkaĵojn el multaj landoj, kiel rusa pano kaj japana sakeo. En la mezo de la tago, la vetero estis tro varma por manĝi ekstere, do oni povas diri, ke la pikniko ne estis pikniko laŭ la vera senco de la vorto, sed la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis ĝueblaj, kaj ne gravas, kie oni manĝis ilin.

Ĉe la balkono malantaŭ la apartamento, ni povis stari por fotografoj, kaj ludi kun pilkoj kaj specialaj iloj por kapti kaj ĵeti la pilkojn. Kelkaj personoj staris sur la balkono, aliaj staris, sidis, aŭ kuŝis sur la herbejo malsupre. La herbejo havis junajn arbojn kaj tre verdan herbon, la ĝusta koloro por Esperanto.

La ĉeestantoj alvenis al la piknikejo per diversaj manieroj, per biciklo, per aŭtomobilo, kaj per trajno. La gastigantoj kondukis kelkajn gastojn el kaj al la trajna stacidomo, kelkaj minutoj for de la apartamento. La pikniko finiĝis je la sesa . ★

– *Stuart GREEN*



## Someraj renkontiĝoj

**Esperanto Kafejo** – La 7-an de julio, pli malpli dek novjorkaj geesperantistoj renkontiĝis en la Esperanto Kafejo en MacDougal Strato. Ni rimarkis libro-breton kun enciklopedio pri filozofio. Do, por varbi Esperanton, mi donacis kopion de la libro "Esperanto: learning and using the international language" al la kafejo por meti en la breton.

**MomaQns** – Nur mi kaj Rochelle ĉeestis la renkontiĝon en la nova kelktempa sidejo de MOMA, la novjorka muzeo por moderna arto. Kvankam malpli granda ol la renovigota, la nova muzeo estis tre interesa, kun ekpozicio pri tempo.

**South Street Seaport** – Nur mi iris al la Seaport je varmega aŭgusta tago. Domaĝe, ĉar la ekpozicio de modelaj boatoj estis belega.

**Riverflicks** – Tri novjorkaj esperantistoj kaj unu pensilvania esperantisto kune vidis la filmon "Shrek" ĉe la kajo 25 en suda Manhattan. Ni babiladis dum la horo antaŭ la filmo, kaj ĝuis krevmaizon vidante la fabelfilmon.

**Fort Tryon Park** – Bedaŭrinde, tiu ĉi renkontiĝo malsukcesis. La vetero estis malbona. La servo en la restoracio ne estis kiel ni atendis, do ni decidis eliri por serĉi alian restoracion. Malbonŝance estis maleble trovi taŭgan restoracion kaj parkejon por 3 aŭtoj, do ni simple hejmeniris. ★

– *Thomas ECCARDT*

## Al la ĝemelaj turaĉoj

*de Thomas Eccadt*


Ho ĝemelaj turaĉoj, supozeble vi estis defiantoj de la Empire State Building.
Malkiel la vera simbolo de Novjorko, vi naskiĝis en nekonata angulo de Manhattan.
Vi kreskis moderne, rapide, plaste, minimume pli alte ol via antaŭulo.
Pro viaj longaj mallarĝaj fenestroj, viaj oficejoj similis malliberejojn.
Pro via absurda grandeco, vi perturbis eĉ la televidan ricevon, ĝis kiam
oni transdonis al vi la regionan antenon.
Ekde tiam, vi fariĝis emblemo de Novjorko, almenaŭ por eksteruloj.
Antaŭnelonge mi legis, ke vi fariĝis gravaj fulmovergoj por suda Manhattan.
Fine, vi, ĝemelaj turaĉoj, fariĝis fulmovergoj por terorismo.

Ho ĝemelaj turaĉoj, pro via malnatura,
geometra formo, vi ŝajnis malstabile.
Efektive, dum forta vento, via balanciĝado
timigis viajn okupantojn.
Antaŭnelonge mi legis, ke je via lasta horo
vi balanciĝis tri metrojn.
Sed ne por eviti la aviadilojn.
Dum kelkaj minutoj, via propra anteno
dissendis la imagon de via agonio.
Sed baldaŭ ĝi silentis, kaj interrompis
televidan servon dum duonjaro.
Kontraŭ antikva novjorka kutimo, viaj
urĝecaj ŝtuparoj troviĝis ne ekstere, sed
en via koro.
Do la aviadiloj tuj detruis ĉiujn viajn
eskapilojn, enkaptigante viajn
okupantojn.
Dum mia juneco, oni spekulativis pri salti
el la Empire State Building.
Nur vi, ĝemelaj turaĉoj, realigis tiun revon.

Ho ĝemelaj turaĉoj, via falo forviŝis ne
nur milojn da vivoj.
Vi detruis ortodoksan preĝejon, kaj ĉiujn
la aliajn konstruaĵojn kun via adreso.
Vi detruis metroojn, vendejojn, kaj vi
forte damaĝis plurajn najbarajn
konstruaĵojn.
Dum monatoj, vi interrompis komercon,
elektroservon, telefonservon, kaj vi
maltransirigeblis la najbaraĵon.
Kaj vi senhejmigis kaj senlaborigis milojn
da homoj.
Dum tiuj monatoj, vi dissendis fumaĉon
da asbesto tra la tutan novjorkan
regionon.
Flanke, vi detruis mian fidon je la
homaro.
Nun vi ne plu estas fieraj turoj, sed truoj.
Sincere, vi, ĝemelaj turaĉoj, devis neniam
naskiĝi! ★



## Laste naskiĝis



Ni ĝojas anonci, ke nia samideanino Renata Kaczmarska naskis filon je la 8-a de septembro! Alexander James pezis 7 funtojn kaj 12 uncojn (3.472 kg) kaj estas longa je 20.5 coloj (52.7 cm). La Esperanto-Societo de Novjorko feliĉe bonvenigas Alexander kaj gratulas la gepatrojn, Renata kaj George Photakis. ★

– *Jim MEDRANO*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Septembro**

**15** — **Beginners Esperanto course begins**
*Sundays, 6:45 pm at the K-Café*

**20** — **ESNY KUNVENO**
**Nijl Blonstein gvidos diskutadon pri la someraj kongresoj**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Oktobro**

**6** — **Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 117)

**18** — **ESNY Kunveno**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

**K-Café**
Second floor of K-Mart, 770 Broadway, NYC
(entrance at Eighth Street & Fourth Avenue)

## Okemo 2002



Ĉu vi jam ĉeestis iun jaron la IES en Vermonto? Ĝi estas tre amuza, interesa, amikema, malstreĉiga renkontiĝo inter kanadaj kaj usonaj esperantistoj el nia angulo de la kontinento, dum la plej bela parto de sezono de kolorriĉaj folioj. Bonvolu kontroli ĝin se ne!

– *Tom ECCARDT*

Mi invitas vin rapide aliĝi al la 9-a Internacia Esperanto-Semajnfino en Vermonto. Vidu detalojn kaj aliĝilon ĉe <*www3.sympatico.ca/esperanto/eo-okemo.htm*>. BONVOLU rapide informi min se vi planas prezenti ion. Ju pli da detalojn vi sendos des pli tio helpos! Mi deziras al vi agrablan aŭtunon. ★

– *Movademe, Normando Fleury, Montrealo*

[Vidu la kunsenditan inform-paĝon]


**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Koresponda Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (914) 738-6084
**Program-Direktoro** Arturo Bonetti (718) 257-6091



**Novjorka Prismo**
Numero 116 – Septembro 2002
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com


© 2002 Esperanto Society of New York